

La Sango de la Marmoto

Édition bilingue espéranto/français



Club Samizdat



Licence Creative Commons

L'auteur restreint l'autorisation de commercialiser son œuvre – identifiée (BY) – à ceux qui en feront la demande auprès de lui (NC), à condition d'en respecter le mode de diffusion choisi (SA).

La Sango de la Marmoto

TRADUIT DE L'ESPÉRANTO
PAR SYLVAIN ERDEPOINZÉ

Club Samizdat

Antaŭparolo

Tiu rakonto estis eldonita en 1955, ĉe la mistera eldonejo R:É. Verkita en Esperanto de anonyma franca aŭtoro (francismoj estas videblaj), ĝi estas la unua volumo de longega serio. Oni scias preskaŭ nenion pri la sekvantaj libroj, ĉar nur la du unuaj estis malkovritaj. Antaŭ kelkaj jaroj, Pierre Charmoz trovis ambaŭ sub matraco en monta rifuĝejo. Se la dua volumo, “Neniu kompato por la marmoto”, estas en tre malbona stato kaj tute nelegebla, ĉi tiu estas pli bone konservita. Multaj paĝoj estas forigitaj, sed preskaŭ la tutan rakonton ni povas restarigi. Malgraŭ la manko de teksto, la titolo de la dua volumo helpos kompreni la finon de tiu ĉi.

Tiu nova, dulingva eldono prezentas mallongigitan version. La tradukinto, Sylvain Erdepoinzé, restarigis mankantajn vortojn, kaj li ankaŭ detranĉis la alineojn aŭ

ĉapitrojn, kiuj estis tro longaj, nelegeblaj, aŭ senutilaj por la ĉefa ago. Ĉi tiujn pecojn li resumis por via informo, en kursivo, inter la aliaj paragrafoj.

Per ĉi tiu eldono, La Klubo Samizdato deziras, ke ĉiu esperantlingvano povu malkovri tiun strangan rakonton.

***Multajn dankojn al Ludivine Delnatte,
Eldad Salzman, Philippe Gindre
kaj Pietro Von Hertz,
pro la helpo kun la esperanta teksto.***

Ĉapitro 1

La komisaro Filipo malkovris la unuan viktimon en monta rifuĝejo. La homo estis mortigita nokte, kiam la aliaj montgrimpantoj dormis profunde. Neniu aŭdis ion ajn, sed kiam la suno komencis lumigi la etaĝlitojn tra la fenestro, la viro estis jam rigida, kun sanga kapo de marmoto lokita sur sia torso.

Nun, la komisaro estis rigardanta la kadavron kaj parolis kun Paŭlo, sia fidela inspektoro. Ili interŝanĝis komentojn pri la kialoj.

«Kiu povas loki tranĉitan kapon de marmoto ĉe mortinto?», flustris la komisaro.

La inspektoro ne respondis. Li nur levis la ŝultrojn.

«Kiu trovis lin?

- Iu montgrimpanto, kiu dormis sur la lito supre.
- Kie li estas nun?

- Li eliris kun la tri aliaj. Ili daŭrigas sian ekskurson.
- Ĉu ili ne konis lin ?
- Ne, sed ili apartenis al la sama grupo de grimpistoj.
- Tio estis organizita ekskursa, do ?
- Jes.
- Bonvolu trovi la liston de la partoprenantoj.
- Kompreneble.
- Ĉu eblas, ke li mortis pro dispepsio ĉar li manĝis la marmoton ?», la komisaro demandis sin per duba voĉo.

La inspektoro denove movis la ŝultrojn. La du policanoj eliris el la rifuĝejo por lasi la sciencan policon labori. Abrupte, la inspektoro kriis al la komisaro Filipo:

- «Estro ! Rigardu alten !
 - Kien ? li demandis surprizita, turnante la kapon tien kaj reen dum li provis trovi siajn okulvitrojn en poŝo de sia skimantelo.
 - Sekvu mian fingron !
 - Ho, diable !»
- Sur altaĵeto iom for, ombro malaperis subite en la malproksimo.

Ĉapitro 2

En ĉi tiu ĉapitro ni sekvas la komisaron Filipo en sia ĉiutaga rutino en Briançon. Ekster tiu malgranda urbo de la francaj okcidentaj Alpoj, li loĝas en dometo kun sia edzino Laŭra. Parolante kun ŝi, li memoras sian junecon, kiam li ludis en la montaj paŝtejoj kun siaj amikoj, fotante ĉiajn bestojn, kaj precipe marmotojn. Li memoras, ke li sukcesis malsovaĝigi iun, kiun li tre ŝatis. Estas tre longa kaj aparte nostalgia ĉapitro.

Ĉapitro 3

Pasis unu semajno, kaj alvenis la konkludoj de la krimomedicina patologo. Sidante ĉe sia skribotablo, la komisaro malfermis la koverton kaj legis la rezultojn.

«[Nekompreneblajn (fi)vortojn]», murmuris li.

Subite, li ege malfermis la okulojn, konsternite. Jen la vortoj, kiujn li legis:

Verŝajne, oni injektiĝis sangon de marmoto en la vejnojn de la viktimo. La hemolitika reago kaj la embolio kiuj sekvis mortigis lin.

PS: La viktimo ne digestis la korpon de la senkapigita marmoto.

La esploro ne progresis ĝis tiu momento. Intertempe, la komisaro ĵus prokrastis la aferon, dum kelkaj inspektoroj estis ekzamenantaj diversajn eblojn. Vane.

«Fek! Filipo diris en sia barbo (kiun li ne havis). Kiu povas mortigi ulon tiel? Kial? Kial marmoto? Kia terura afero!»

Ekstarante, li vokis inspektoron.

«Inspektoro!» (Ĵus kiel mi skribis). Paŭlo malfermis la pordon, anhelanta.

«Jes, komisaro?

– Mi postulas, ke vi serĉu ĉiujn homojn, kiuj havas iun ajn rilaton kun marmoto.

– *Rilaton*, estro?

– Jes, *rilaton*. Ĉu problemas?

– Ne, estro. Kompreneite. Ĉu estas io alia?

– Jes, alportu al mi varman ĉokoladon, bonvolu.

– Je via servo, estro.»
La inspektoro turnis sin kaj rapidege foriris.

Ĉapitro 4

La duan viktimon oni malkovris tri tagojn poste. Denove la homo estis murdita dum la nokto en monta rifuĝejo. Denove neniu sciis ion ajn. Denove sanga kapo de marmoto staris sur la torso de la kadavro.

«Ĉu estis alia organizita ekskurso? demandis la komisaro.

– Jes ja, respondis la inspektoro Paŭlo, kiu jam komencis la enketon.

– Kaj la aliaj partoprenantoj foriris al la montoj, ĉu ne?

– Ja.

– Do vi scias kion fari.

– Trovi la liston de la uloj, kiuj partoprenis en la ekskurso.

– Jes ja.»

Dum la sciencaj policistoj serĉis spurojn, la komisaro observis la scenon, dube.

«Ĉu estas enirejoj?

– Kio?

– La sango de la marmoto... Kie ĝi eniris en la vejnojn de la viktimoj ?

– Estas kvar truoj en la kolo, sed ili rapide malaperas, kvazaŭ ili resaniĝas. Baldaŭ ili ne plu estos videblaj. Estas tre tre strange.

– Ho. Jen la kialo de la manko de mencio pri ĉi tiu temo en la raporto... »

Sen pliaj vortoj, la komisaro eliris el la ejo, pensante pri iu ajn murdinta marmotvora vampiro. Jus kiam li estis forlasanta la lokon, li vidis ombron senmovan sur proksima altaĵeto. Iu – aŭ io – ŝajnis spekti la scenon. Li uzis sian manon kiel vizieron por enfokusigi sian rigardon en ĝian direkton, sed la nigra silueto subite malaperis. Denove.

Ĉapitro 5

La plejparto de ĉi tiu ĉapitro estas difektita de humido. Kelkajn frazojn ni tamen povas decifri. La komisaro ludante kroketon kun sia edzino plenigas multajn paĝojn. Ŝajnas ke ili ambaŭ tre ŝatas tiun ludon. Ili ludas ekstere, kompreneble, sed ankaŭ sur la tapiŝo de la salono ! En la fina parto de la ludo, Laŭra bonege uzas la pilkojn, sed ĉar

*Filipo havas precizan kaj potencan frapon,
la ludo finiĝas kun lia venko.*

Ĉapitro 6

La komisaro Filipo estis profunde dormanta. En siaj sonĝoj, li estis sur herbejo, ludante kun homgranda marmoto.

«Kia bela marmoto!» li flustris en sia dormo.

Unu post la alia, ili ruliĝis kiel infanoj laŭ la deklivo, laŭte ridante. Ĵus kiam li prenis sian amikinon per la mano, la telefono sonoris. Li eksaltis kaj preskaŭ falis sur la plankon.

Estis la inspektoro Paŭlo.

«Estro, mi havas novaĵojn pri la viktimoj. Mi serĉis iliajn nomojn en la kriminala registro kaj trovis ambaŭ ene. Ili ambaŭ estis kondamnitaj pro ŝtelĉasado de marmotoj en la montpaŝtejoj!

– Ĉu vere? Tio estas gravega informo! Ĉu vi finfine trovis ion ajn pri marmotrilataj personoj?

– Jes. Ne estas multe, malfeliĉe, sed

du homoj povus esti ekzamenitaj: la administrantino de la Faŭna kaj Flaŭra Ekskursoklubo, kaj la direktoro de marmotrezervejo.

— Perfekte. Mi tuj iras al la rezervejo. Iru al ĉi tiu ekskursoklubo, bonvolu. »

Ĉapitro 7

Ĉi-foje la inspektoro Paŭlo estas la cefrolulo de la ĉapitro. Ni sekvas lin, kiam li iras al la ekskursoklubo, en kiu la viktimoj partoprenis. Tie, li renkontas la belegan administrantinon. Laŭ la malbone videblaj signoj, ili pridiskutas la murdojn, sed ne nur tion, ĉar ili multe ŝatas unu la alian. Do la knabino invitas la inspektoron Paŭlo ludi bilardon kaj manĝi glaciaĵojn. Laŭ li, si probable ne kulpas. Poste, li iras en gvatmision por la komisaro. La sekva ĉapitro komenciĝas, kiam ni retrovas Filipon.

Ĉapitro 8

La marmotrezervejo aspektis kiel batalkampo. Sur la ĥaosa grundo kreskis nur kelkaj tufoj da herbo. La nestotruoj estis

kiel obuzokrateroj; la marmotoj nevideblis. Maljuna, malpura viro, kies mizera vesto malbonodoris du metrojn for, alproksimiĝis al la komisaro. Li ŝajnis kolera.

« Kion vi volas ? li kraĉis, malkontenta.

– Mi estas policano. Mi havas kelkajn demandojn. »

La komisaro montris sian polican karton al la viro, kies okuloj ardiĝis.

« Kion vi volas ? ripetis la viro.

– Temas pri la du murdoj, kiuj okazis lastatempe... Ĉu vi aŭdis pri tiu afero ?

– Jes. Kio do ?

– Ni nun scias, ke la viktimoj kutimis ĉasi marmotojn. Ĉu vi eble havas informojn pri tiaj uloj ?

– Ne. Sed ŝtelĉasado ofte okazas ĉi tie. Ĉu ili volis la sangon de la marmotoj ? Nun ili havas ĝin !

– Kiel vi scias pri la sango de la bestoj ?

– Mi legas la gazeton *Daŭf'*.

– Ah... Kompreneble.

– Ĉu io pli ?

– Hmm... Ne, dankon pro viaj afablaj respondejoj. »

La viro respondis nenion plu, turnis sin kaj revenis al sia ruiniĝanta domo.

«Interese!» siblis la komisaro antaŭ ol foriri.

Ĉapitro 9

La inspektoro ne certis, ĉu la observado de la rezervejestro estis la plej bona ideo, sed li devis fari tion, kion la komisaro ordonis.

«La homo forlasas sian hejmon, li diris en la radio.

– Bone, respondis la komisaro, tiu ulo estas suspektinda, li estas senkondiĉa por-marmotulo. Laŭ la odoro, li verŝajne restas nokte en iliaj ternestoj. Sekvu lin, mi jam estas survoje.»

Iom poste, kiam noktiĝis, la du policanoj estis pašantaj kune sur la monto, sekvante la malrapidan fetoran ulon tra la nokto. Kvankam la viro estis maljuna, li iris tre rapide malgraŭ la kruta deklivo. Malantaŭe, la du policanoj anhelis, iliaj koroj laŭtege batantaj.

«Kien. Iras. Ĉi. Tiu. Stultulo. La komisaro malfacile prononcis, tranĉante la frazon inter ĉiu vorto kaj provante respiri.

– Mi iom konas tiun zonon, diris la inspektoro – li estis pli junaj kaj pli sportema ol Filipo. Laŭ mi, estas nur arbaro en ĉi tiu direkto. »

Dum ili parolis, la marmotulo malaperis malantaŭ la monteto.

«Rapide! Ni nepre ne perdu lin!»

Paŭlo plirapidigis. Tamen, la komisaro ne povis sekvi lin. Kraĉante siajn pulmojn, li surgenuigis. En bovan fekaĵon. Larmoj alvenis al liaj okuloj kaj perlis sur siaj palpebroj, sed pro timo fali, ili revenis en la larmajn saketojn. Post centoj da metroj, la inspektoro estis elĉerpita. Li bedaŭre rezignis la postkuradon por helpi la komisaron. Li revenis malsupren kaj helpis lin ekstari.

«Kuraĝu! Ni certe trovos kien li iris. En arbaro, spuroj estas pli facile rimarkeblaj.

– Prave, inspektoro. Bonvolu nur atendi, ke mi ekspiru. »

Kelkajn momentojn poste, do, ili denove grimpis. Malrapide sed volente ili marĉis. Kiam ili atingis la pinton de la monteto, ili malkovris grandegan obskuran arbaron, tro malhelan por por orientigi.

«Ne estos facile resti nevideblaj, sed ni daŭrigu!» la komisaro Filipo rekomencis, lumigante sian lampon.

Ĉapitro 10

Dum la policanoj estis travivantaj tiujn malfacilajn momentojn, la direktoro de la marmotrezervejo paſis trankvile en la arbaro – trankvile laŭ li, kompreneble, ne laŭ liaj du persekutantoj. Li eĉ ne rimarkis ilin, ĉar li estis tute koncentrita pri tio, kio estis antaŭ li. Li perfekte konis la arbaron, ĉiun arbon, ĉiun rokon, ĉar li oftege trairis ĉi tiujn lokojn. Li eĉ ne bezonis lanternon. Liaj piedoj konis la vojon.

Ĉapitro 11

La arbaro estis terura mondo por la du policanoj. La plej eta bruo en la vegetaraĵo, la plej eta movo en la lumfasko, ĉio timigis ilin.

- «Ni estas perditaj, la inspektoro konfesis.
- Fek. Kaj refek. (Estis la komisaro.)
- Ankaŭ mi pensas same.
- Ni sekvu niajn proprajn spurojn.

Alimaniere ni povas cirkaŭiri dum la tutan nokton.

– Jen ili, estro. Ni forlasu ĉi tiun kośmaran lokon.»

Post kelkaj minutoj, ili vidis lumon tra la foliaro. Al tiu luma punkto ili aliris: estis lumigita fenestro.

«Al kiu apartenas tiu domo, tiel profunde kaſita en la arbaro? demandis la komisaro.

– Mi tute ne scias. Eble ĉi tiu estas la ejo, kie la rezervejestro planas siajn murdojn... kun siaj komplikoj?

– Kaj eble ni trovos la ilon, kiun li uzas por trabori la kolojn de la viktimoj. Ni iru antaüen!»

Ili alproksimiĝis al la lumigita fenestro en la plej granda silento. Diskrete, ili rigardis tra la polva vitro. La marmotulo estis sidanta kun geamikoj ĉirkaŭ larĝa tablo, ĉu laŭte ridantaj pri io, ĉu trinkantaj blankan vinon. Ili turnigis longajn pikojn en fromaĝpoto. Seniluziigitaj pro tio, ke ili faris ĉion ĉi por nenio, la du policanoj foriris, ĉirkaŭirante la konstruaĵon. Ili konstatis, ke la domo ne vere estis kaſita en la naturo: aŭtoj estis

parkumitaj en la korto, kaj vojo forkondukis al proksima vilâeto, kies tegmentoj estis videblaj.

Ĉapitro 12

La seniluziigo estas tiel granda, ke niaj du policanoj pasigas la nokton drinkante bierojn en sordida kafejo, ĉirkaŭitaj de allogaj trotuarulinoj en mallongaj roboj. Ĉi tiu ĉapitro finiĝas, kiam ili vomas en defluejon, sub la rigardo de scivolema devaga hundo.

Ĉapitro 13

La tria viktimo estis malkovrita la sekvan matenon; la direktoro de la marmotrezervejo, kiu pasigis la tutan nokton kun siaj amikoj, estis fakte senkulpigita. Estis tiom da sango de marmoto tiufoje, ke la kadavro ŝajnis flosi sur lago de purpura akvo. La kapo de la besto estis turnita al la vizaĝo de la kadavro, kvazaŭ ili diskutus, kurioza Jorik aŭskultante mortintan Hamleton. Denove, la partoprenantoj de la ekskurso estis forlasintaj la rifuĝejon antaŭ ol la polico alvenis.

Eksperto de la *Scienca* ekzamenis la korpon.

«Kio pri la truoj en la kolo? pridubis la komisaro Filipo, kiu ankoraŭ suferis postdrinkan kapdoloron.

– Vidu, diris la sciencisto, ili ankoraŭ estas videblaj ĉi tie.»

Fakte, la policisto rimarkis kvar vundojn sur la karotido: du tre maldikajn kaj du pli larĝajn supre. Dum li rigardis, ili malrapide forvelkis.

«Ĉu vi havas klarigon pri ĉi tiu stranga fenomeno?

– Tute ne, bedaŭrinde. La tri viktimoj havis la samajn, sed ili malaperis antaŭ ol ni povis analizi ilin.

– Ĉu vi havas ideon pri la ilo, kiu povus fari tion?

– Ne. Sed ĝi verŝajne enhavas resanigan produkton, kiel la enzimoj produktitaj de iuj sangosuĉaj kreaĵoj.

– Ĉu vampiro?»

La scienculo hezitis:

«... Vampiroj trinkas sanguon, ili ne injektas ĝin. Krome, ili ne ekzistas. Ne, ĝi estas probable nova kirurgia ilo...»

Kiam li forlasis la rifugejon, la komisaro tuj rigardis ĉirkaŭen, serĉante la ombron. Sen surprizo, li vidis ĝin sur malproksima monteto, ĵus kiel la antaŭajn du fojojn, kaj denove ĝi malaperis subite.

Ĉapitro 14

En policejo, ne nur estas interesaj kriminalaj aferoj. Tiu sufice longa dekkvara ĉapitro montras tion. Inspektoroj pridemandas atestantojn pri ciaspecaj aferoj dum la komisaro Filipo grumblas en sia oficejo, trinkante sian varman ĉokoladon.

«*Ĉu vi vidis la hundon mordi la katon de sinjorino Machin ?»*

«*Ĉu vi scias, ĉu la filo de sinjoro Bidule ŝtelis la mopedon de tiu sinjoro Truc ?»*

«*Kion vi estis faranta, kiam la rubujo ekbrulis ?»*

«*Al kiu apartenas la bovino, kiu eniris en vian manĝoĉambron ?»*

«*Ĉu ili vere kolorigis ĉiujn viajn ŝafojn rozkoloraj ?»*

Capitro 15

La inspektoro Paŭlo jus eniris la oficejan ĉambron sen frapi la pordon.

«Estro, mi havas gravajn novaĵojn pri la marmotaj murdoj !

– Ek !

– Ankaŭ la tria viktimo estis ŝtelĉasisto de marmotoj.

– Ĉu ĉi tio kondukas al alia konkludo ?

Vi scias kiel mi, ke niaj du suspektatoj estas certe senkulpaj...

– Jes, sed mi havas alian novaĵon. Temas pri la partoprenantoj en la ekskursoj.

– Do ?

– Mi finfine ricevis ĉiujn listojn : la sama viro partoprenis en ĉiuj sangaj ekskursoj !

– Ĉu vere ? Finfine indiko ! Ĉu vi konas lian profesion ?

– Jes. Atendu... »

La inspektoro turnis kelkajn paĝojn.

«Li laboras kiel dentisto en Parizo.

– Dentisto ? Ha ! Do li estas ĥirurgo ! Bonege, inspektoro, mi devas gratuli vin ! Sed kial li mortigas ŝtelĉasistojn ? Tio estas granda mistero...

– Ne estas ĉio, estro. Mi parolis kun la organizantoj, kaj mi eksciis, ke tiu ulo neniam kompletigis supreniron. Ĉiam li rezignis antaŭ la fino: li ĉiam foriris post la murdoj.

– Io alia?

– Jes. Li ankaŭ partoprenos en la venonta ekskurso.

– Perfekte, inspektoro. Ni tenas nian murdiston.»

Kiam ili iris al la ekskursoklubo, restis nur unu eblo aliĝi al la venonta. Do la komisaro aliĝis, ĉar li estas sperta montgrimpanto. Certe li ne estis sufice trejnita por kuri sur la monto, sed li povis paŝi kaj grimpi senfine, kredu min.

«Bonvolu demandi al la organizanto, ĉu nia suspektato mencias la kialon de sia transfuĝo, petis la komisaro.

– Je via servo, estro.»

Dirante tion, la inspektoro eliris el la oficejo.

Ĉapitro 16

La unua tago de la supreniro estis relative trankvila – la gvidisto klarigis, ke ĝi malfaciliĝos je la dua tago, ĉar la monto iĝos pli kruta, kaj ili ŝnuriĝos por atingi la kreston.

La komisaro observis la dentiston dum la tuta vojo. Li havis etan nazon kaj ardantajn vangojn, kaj li estis iom dika sed sufice vigla. Lia rigardo ĉiam ŝajnis timigita.

«Li estas maltrankvila, pensis Filipo... Suspektas!»

Ĉi tiu penso plifortigis lian konvinkon. Ili atingis rifuĝejon ĵus kiam la oranĝkolora suno estis malaperanta malantaŭ la pintoj. Ili rapide glutis vespermanĝon kaj iris dormi frue. Ili ĉiuj ŝajnis lacaj malgraŭ la relative facile vojo: ili ĉefe estis komencantaj montgrimpantoj. La komisaro volis preni la liton sub tiu de la dentisto, sed la viro kontraŭstaris – li asertis, ke li timas altaĵojn (!). Domaĝe, sed li ankoraŭ kaptus lin en ĵusa delikto! Li vidus, kun kiu li traktis!

Ĉapitro 17

Jen kultura ĉapitro pri marmotoj. Ni lernas, ke Marmoto estas holarktisa genro de mamuloj el la ordo de ronĝuloj, familio sciuredoj. Entute oni agnoskas dekkvin speciojn en la genro. Arealoj de la plej konataj specioj inkluzivas plejparte montarajn areojn kiel Alpoj, Karpatoj, Tattroj, Pireneoj kaj nordaj Apeninoj en Eŭropo, Roka Montaro, Kaskada Montaro, Nigraj Montetoj kaj Sierra Nevada en Norda Ameriko, Deosai-plato en Pakistano kaj Ladako en Barato. Krome marmotoj troveblas en vastaj kaj sekaj Eŭraziaj stepoj. La Alpa marmoto (*Marmota marmota*), pri kiu temas ĉi tiu rakonto, troveblas en montaj regionoj de Alpoj kaj Karpatoj (Jes! Guste kiel la vampiroj!), je altnitudo inter 800 kaj 3000 metroj.

Marmotoj plej kutime vivas en ternestoj aŭ en piloj de falintaj rokoj. En malvarmaj regionoj ili vintro dormas. Plimulto de marmotoj estas tre sociemaj kaj kunekzistas en grandaj grupoj. Ili uzas laŭtajn fajfojn kiel signalojn por komunikado, aparte en danĝero.

La dieto de la marmotoj plejparte konsistas je plantaj partoj kiel herboj, beroj, likenoj, muskoj, radikoj kaj floroj. Homoj konis marmotojn ekde antikvaj tempoj. La plej frua mencio de marmoto en skola verko estas la priskribo de «or-fosantaj formikoj» el raporto de antikva greka historiisto Herodoto de la -5-a jarcento. Laŭ esploroj de franca etnologiisto Michel Peissel fakte temis pri himalaja marmoto en Deosai-plato kaj emulo de lokaj triboj kiel brokpoj ellavi oran polvon en marmotaj ternestoj.

La etimologio de la vorto «marmot» estas neklara. Laŭ unu teorio ĝi devenas de gaŭla-latinida prefikso marm-, signifanta «murmuro». Alia ebla deveno estas de post-klasika latina mus montanus, t.e. «monta muso».

Capitro 18

Malgraŭ siaj penoj, kaj pro laceco, la komisaro ne sukcessis resti veka dum la tuta nokto, kaj profunde dormis. Li denove songis pri la bela marmoto. Ili sidis sur monteto, mano en mano, kaj rigardis virojn

kapti marmotojn. La giganta marmoto estis ploranta, kaj ĝiaj larmoj malsekigis sian hararon. Sur la alpa herbejo ĉasis ĉiuj viktimoj de la rifuĝeja murdisto: la tri unuaj, kaj la nova; tiu, kiu partoprenis en la lasta ekskurso... Tiumomente, la komisaro vekiĝis, kiam iu ekkriis: grimpisto ĵus malkovris *la* novan viktimon, kun la sama surscenigo kiel la aliaj. La komisaro ekstaris kaj rigardis la malsupran liton: la parizano ŝajnis dormi. Post kvaronhoro, antaŭ ol la polico alvenis per helikoptero, la grupo foriris por la dua ekskursa tago, matenmanĝo trans la gorĝon. Ĉi-foje, Filipo ne pripensis rigardi montetojn por vidi ĉu la ombro estis tie aŭ ne.

Ĉapitro 19

La policano kunpremis la dentojn dum li grimpis la krutan montoflankon. Lia trapikanta rigardo estis fiksita sur la facilmonta figuro antaŭ li, tiu de la suspektulo, kiun li spuris. La vento fajfis inter la rokmuroj, kaj ĉiu paŝo estis lukto kontraŭ gravito.

Filipo decidis, ke la murdisto ne forglitos. Ili mar̄sis tra mallarĝaj intermontoj kaj akraj krestoj: ĉiu mispašo povus signifi fali en la malplenon. La policano devis resti koncentrita, sed laceco komencis atingi lin. Se li ne kaptus la grimpulon sur la kruta kornico supre, li perdis eblecon kapti lin: la krimulo povus profiti de tiu mallarĝa kaj horizontala stroj punktita de likeno por eskapi. Post horoj da laciga grimpado, ili atingis la malvastan balkonon.

La vento balais tra la maldika promontorio, igante ambaŭ virojn tie ŝanceliĝi. Filipo eltiris sian paflon. La fuĝanto antaŭmetis siajn manojn, plorpetante.

«Lasu min foriri, mi tro timas altaĵojn,» li diris per tremanta voĉo.

La komisaro kunpremis siajn dentojn kaj ne respondis. Se la dentisto ekkurus sur la kornicon, li ne sukcesus kapti lin. Kun furioza decidemo, li ĵetis sin al la grimpulo, trenante lin en senesperan lukton ĉe la rando de la krutaĵo. Iliaj korpoj miksiĝis; kelkfoje obtuzaj krioj akompanis ilian lukton.

En lasta malespera peno, la komisaro

sukcesis alpingli la murdiston al la tero. Lia pafilo celis lin.

«Estas finite,» li diris raŭke. Lia koro batadis.

La parizano rigardis lin rekte en la okulojn, kun miksaĵo de timo kaj nekompreno.

«Vi eraras, sinjoro,» li flustris antaŭ ol permesi al la komisaro mankatenigi lin.

Kiam Filipo pene ekstaris, aŭdiĝis malbonaŭgura krako. La kornico krakis sub ilia pezo. Kun krioj da surprizo, la du viroj perdis la ekvilibron kaj ruliĝis kune en la malplenon. Mirakle, ili ambaŭ surgrundiĝis en dorna junipero, kelkajn metrojn sub la kornico.

«Nu, mi supozas, ke ni havis nian falon, finfine,» diris la komisaro inter spasmaj spiroj.

Capitro 20

Tamen la situacio estis timinda: la junipero ekfleksis sub ilia pezo. Post kiam li ŝnuris la dentiston, la komisaro sukcesis reiri sur la parton de la kornico, kiu ne falegis. Li faris mortan ĉirkaŭon ĉirkaŭ roko kaj malfacile hisis la parizanon – precipa pro la mankatenoj. Poste, malgraŭ longa kaj danĝera vojo reen, ili alvenis ĉe la rifuĝejo dum la sunsubiro. Inspektoroj atendis ilin por akompani la dentiston al la parkejo, deirpunkto de la ekskurso. Ili igis la kaptiton sidi en la polica veturilo kaj kondukis lin al la ĉelo. Proksime al la rifuĝejo, kie li restis por ripozi, la komisaro Filipo turnis sin al la malkreskanta ruĝa suno, malantaŭ monteto. Tie, tiel nigra kiel tenebroj, ombro staris. Malrapide, ĝi kliniĝis, alprenante kvar piedan sintenon, kaj fortunis sin de lia vido.

Dum momento, la komisaro kredis rekoni la silueton de la bela grandega marmoto de siaj revoj.

LE SANG DE LA MARMOTTE

*Traduit de l'espéranto
par Sylvain Erdepoinzé.*

Avant-propos

Ce roman a été édité en 1955, par la mystérieuse maison d'édition R:É. Écrit en espéranto par un auteur anonyme, il s'agit du premier volume d'une longue série. On ne sait presque rien des livres suivants, seuls les deux premiers ont été retrouvés, il y a quelques années, par Pierre Charmoz sous un matelas dans un refuge de montagne. Si le second volume, Pas de pitié pour la marmotte, est en très mauvais état et complètement illisible, celui-ci est bien mieux conservé. De nombreuses pages sont manquantes, mais on peut néanmoins recon-

tituer la majeure partie de l'histoire. Malgré l'absence du corpus, le titre du second volume aidera à comprendre la fin de celui-ci. Cette nouvelle édition bilingue présente une version abrégée. Le traducteur, Sylvain Erdepoinzé, a dû extrapoler des mots manquants; il a également écarté certains paragraphes ou chapitres trop longs, illisibles ou inutiles pour l'action principale. Certains de ces passages sont résumés, en italiques, entre les passages conservés. Par cette édition, le Club Samizdat ambitionne de faire découvrir à chaque espérantophone ou espérantophile, une histoire peu banale et mystérieuse qui montre que le roman populaire n'était pas absent des publications en espéranto.

Chapitre 1

Le commissaire Philippe découvrit la première victime dans un refuge de montagne. L'homme avait été tué pendant la nuit, alors que d'autres alpinistes dormaient du sommeil du juste. Personne n'avait entendu quoi que ce soit mais, quand le soleil commença à illuminer les lits superposés au travers de la fenêtre, l'homme était déjà raidî par la mort, une tête de marmotte ensanglantée posée sur sa poitrine. Tout en examinant le cadavre, le commissaire discutait avec Paul, son fidèle second. Ils s'interrogeaient sur les motifs d'un tel crime.

« Qui peut déposer une tête tranchée de marmotte sur un macchabée? », marmonna le commissaire.

L'inspecteur ne répondit pas. Il se contenta de hausser les épaules.

« Qui l'a découvert ?

— Un alpiniste qui dormait sur le lit du dessus.

— Où est-il maintenant ?

— Il est parti avec trois autres. Ils poursuivent leur ascension.

— Ils ne le connaissaient donc pas ?

— Non, mais ils faisaient partie d'un même groupe d'excursionnistes.

— C'était une excursion organisée, alors ?

— Oui.

— Veuillez me procurer la liste des participants.

— Je m'en occupe tout de suite.

— Serait-il possible qu'il soit mort d'une indigestion de marmotte ? », interrogea le commissaire sur un ton mi-figue mi-raisin.

L'inspecteur haussa de nouveau les épaules. Les deux policiers quittèrent le refuge afin de laisser travailler la police scientifique. Soudain, l'inspecteur interpella le commissaire Philippe :

« Chef ! Regardez là-haut !

— Où ça ? demanda le commissaire, en tournant la tête ici et là tout en essayant de

trouver ses lunettes dans une poche de sa parka.

– Suivez mon doigt!»

Derrière une bosse, à quelque distance, une ombre disparut brusquement.

Chapitre 2

Dans ce chapitre, nous suivons le commissaire Philippe dans sa vie de tous les jours, à Briançon. Il habite un chalet avec sa femme, Laure, en périphérie de cette petite ville des Alpes dauphinoises. Lors d'une discussion avec elle, il se remémore sa jeunesse, lorsqu'il jouait dans les alpages avec ses amis, photographiant tous types d'animaux, tout particulièrement les marmottes. Il se souvient qu'il était parvenu à en apprivoiser une, qu'il avait beaucoup aimée. Il s'agit d'un très long chapitre, plutôt nostalgique.

Chapitre 3

Il se passa une semaine avant que ne soient rendues les conclusions du médecin légiste. Assis à son bureau, le commissaire ouvrit l'enveloppe et lut les résultats.

« [*(Gros) mots incompréhensibles*] », murmura-t-il.

Puis, il ouvrit grand les yeux, surpris :

Il semblerait que l'on ait injecté du sang de marmotte dans les veines de la victime. Une réaction hémolytique et l'embolie ont suivi, causant sa mort.

P.S.: La victime n'a pas ingéré le corps de la marmotte décapitée.

Par ailleurs, l'enquête n'avait pas progressé. Le commissaire avait mis l'affaire de côté pendant que quelques inspecteurs examinaient diverses pistes. En vain. « Merde! déclara Philippe dans sa barbe (qu'il ne possédait pas). Qui peut tuer quelqu'un de cette manière? Pourquoi? Pourquoi une marmotte? Quelle histoire terrifiante! »

Se redressant, il appela un inspecteur.

« Inspecteur! » (Exactement ce que je

viens d'écrire.) Paul ouvrit la porte, essoufflé.
« Oui, commissaire ?

— Je souhaite que vous recherchiez toutes les personnes qui ont une quelconque relation avec les marmottes.

— Une *relation*, chef ?

— Oui. Une *relation*. Quelque chose vous turlupine ?

— Non, chef. Compris. Est-ce qu'il y a autre chose ?

— Oui, apportez-moi un chocolat chaud, voulez-vous ?

— À votre service, chef. »

L'inspecteur fit volte-face et s'éclipsa.

Chapitre 4

On découvrit la seconde victime trois jours plus tard. Encore une fois, elle avait été assassinée pendant la nuit dans un refuge de montagne. Encore une fois, personne ne savait quoi que ce soit. Encore une fois, une tête de marmotte ensanglantée reposait sur le torse du cadavre.

« Était-ce une autre excursion organisée ? demanda le commissaire.

